

Genro-neŭtrala lingvouzo

X-lingvo - 08/12/2021 - Jade Joannot

- Perforta lingvouzo pro genraj kialoj okazas en multaj formoj
- Strategioj por batalado kontraŭ perforta lingvouzo pro genraj kialoj
- Interŝanĝu bonajn praktikojn. Ankaŭ diskutu la defiojn trovitajn rilate al viaj propraj lingvoj, kiam oni parolas pri komunikado, kiu konsideras genron
- Faru skizon de tio, kio jam ekzistas, kio estas realigebla, aŭ de tio, kio malfacilas rilate al viaj denaskaj lingvoj

Transkribado duope/pare

Lingva ilaro

- ★ Kun kiu la leganto **empatias**? Kiuj agoj kaj kondutoj estas priskribitaj (kiel) ĝustaj kaj malĝustaj? Kiuj agoj aŭ kondutoj estas pravigitaj (per emocio, eksteraj faktoroj ktp) kaj kiuj ne?
- ★ Sur kiuj kampoj de la vivo (laboro, interrilatoj) vi fokusiĝas kiam vi priskribas personon? Ĉu estas la samaj kiam vi priskribas homon de alia genro? Kio estas priskribita kiel kvalito aŭ difekto de persono? Ĉu tio ŝanĝas depende de genro de la persono?
- ★ Diskutante perfortan agon: Ĉu klaras, **kiu kulpis**? Ĉu la homo estas nomita aŭ ne? Ĉu la lingvaĵo fokusiĝas sur la kulpulo aŭ al la viktimo: (X mortigis Y vs Y estis mortigita de X)
- ★ **Neŭtraligo**: Ĉu formoj uzataj de vi estas genro-neŭtralaj? Se ili estas gramatike neŭtralaj, ĉu la konotacio fokusiĝas sur iu genro? Ĉu ili “vere” estas neŭtralaj, aŭ ĉu la vira formo uzatas kiel universala/kutima formo (ekz. angle “Mankind”)? Ĉu vi povas trovi iun formon, kiu havas malpli da konotacioj kaj substitui ilin?
- ★ **Virinigo**: Dum diskuto de homgrupo, ĉu **videblas**, ke virinoj estas parto de la grupo? En kiuj kuntekstoĵ oni uzas inajn formojn sole kaj kune kun la viraj? Kiel tio influas aspekton de la grupo? Ĉu ĝi reflektas la realon (ekz. profesion kun plimulto da virinoj) aŭ ĉu oni uzas ĝin por doni certan signifon de virinoj en specifaj postenoj?
- ★ Kiam oni diskutas **seksecon** de persono, kiun vidmanieron vi alprenas? Kiujn vortojn vi uzas por diskuto pri ne aliseksema rilato? Ĉu la vortoj **minimumigas** la rilaton (ekz. “du bonaj amikoj”) aŭ troseksigas ilin? Ĉu vi uzas la samajn vortojn por diskuti pri aliseksema rilato? Ĉu la vortoj por priskribi samseksemon havas negativajn konotaciojn?

”Genro-neŭtrala lingvouzo” en viaj lingvoj

- ★ Problemo kun gramatiko: genra duumeca divido de genroj estas esenca parto de lingvo (Slavaj lingvoj++)
- ★ Malhavo de konceptoj por distingi seksojn/genrojn (la bulgara)
- ★ Neesto de gramatika genro = neniuj diskutoj pri genro neŭtrala lingvo, fokuso al aliaj aferoj (la kartvela, la kantona, la armena, la turka, la azerbajĝana)
- ★ Problemo kun la « fluo »/integriĝo en la lingvon (la germana, la franca)
- ★ Ekzisto de neŭtrala gramatika genro: uzata por objektoj (slavaj lingvoj, la greka). Oni povas uzi ĝin por genro-neŭtralaj personoj (la greka)